

La Juna Vivo

Eldonas: TUTMONDA ESPERANTO JUNULAR-ORGANIZO.

Redakcio: Markt 64, Geleen. Administracio: Steenschuur 10, Leiden Ndlo.

ALVOKO PRO KUNLABORO KAJ KOMPRENADO!

Nun, du monatoj post mia elekto kiel internacia prezidanto de F.E.J.C., mi havas ioman bildon pri la nuna stato de nia organizo kaj la laboro faranda. Mi opinias, ke precipe nun estas necesa, ke ĉiuj membroj estas informitaj pri tiu stato por ke ili konsciu kion ~~ni faru nepre~~, ~~por savi la movadon el la nuna krizo.~~ La klarigoj, kiuj mi donas en ĉi tiu numero de L.J.V., estas laŭ la estraro urĝe necesaj. La multaj reagoj al la marta kaj aprila numeroj de L.J.V. montras, ke feliĉe ekzistas granda kerno de fidelaj F.E.J.C. membroj; sed ankaŭ montriĝas, ke ekzistas inter la anaro maltrankvileco pri la pluekzistado de nia movado. Mi konscias, ke por tiu maltrankvileco ekzistas gravaj motivoj, sed feliĉe mi povas atesti, ke F.E.J.C. ne mortis kaj ne mortos tiom longe, kiel la nunaj fideluloj restos sur siaj postencoj.

La jarkunsido en Hilversum havis kelkajn gravajn rezultatojn. Unualoke gravas la principaj decidoj, ke nia organizo havu praktikajn kaj idealismajn celojn, kaj ke junuloj partoprenu la gvidadon de F.E.J.C. La altnivelaj debatoj, kiuj kondukis al ĉi tiuj rezultatoj, certe ne plene solvis la ĉi-rilatajn demandojn, sed la rezultatoj estis pozitivaj. Positiva rezultato estas ankaŭ la elekto de nova estraro kaj la akcepto de la invito de L'Aquille por la lla I.J.K. en 1955. Nia aktiva amiko Bronzetti jam energie eklaboris, pliajn detalojn vi trovos alipage.

La jarkunsido ankaŭ liveris negativan rezultaton, ĝi ne sukcesis elekti kompletan estraron en Nederlando. La centra estraro nun konsistas el tri personoj: Kees Kranenburg por la administracio, subskribinto por la prezidenta tasko kaj s.ino Burgler por tri funkcioj: sekretario, redaktoro kaj provizora kassistino. Fakte estas bezonataj ankoraŭ du personoj por kompletigi la centron kaj ni faras nian eblon trovi almenaŭ unu.


La nova estraro trevis F.E.J.C.n en terura stato. Pri la financoj ni ne jam havas tre klaran bildon, sed ekzistas granda ŝuldo ĉe la presisto de L.J.V. Pro la nekunlaboro de la perantoj ĝis Hilversum ni ne scias, ĉu F.E.J.C. havas gravajn posedaĵojn ekster Nederlando. La korespondado estis tre malzorgita, amase da leteroj jam pli ol duonjaro atendas respondon. La administracio estas malbonorda, ĉar la perantoj ne sendis membrliston k.t.p. Entute ni povas diri, ke la situacio estas ĥosa kaj ni staras antaŭ la grandioza tasko, refunkciigi la organizan aparaton kaj solvi la neklarigejn.

Oni certe komprenas, ke ni ne povas plenumi tiun taskon en kelkaj monatoj. La estraro energie laboras, sed ni nur estas homoj kaj krome ni estas troŝarĝitaj, ĉar la centro estas nekompleta. Ni provos kiel eble plej baldaŭ reordigi la financojn kaj la membradministracion kaj restarigi regulan kontakton kun eŭsterlando. Ni provos krome regule aperigi L.J.V., provizore stencilita, ĝis kiam la financaj malfacilaĵoj estos solvitaj. Bedaŭrinde ni malsukcesis sendi al ĉiuj membroj septembran L.J.V. ĝustatempe, pro malavantaĝojn ĉe la multobligado.

Unu fakto estas eksterduba, se la estraro sola devas solvi la malfacilaĵojn, ĝi malsukcesos. Necese estas kunlaboro de ĉiuj F.E.J.C. anoj kaj precipe de la perantoj. La perantoj sendu al ni membrliston de sia regiono, enkasigu la kotizojn kaj sendu ilin al la centro; la perantoj kaj la membroj kune okupu sin pri la verbado de novaj membroj. Ni bezonas vian kunlaboron ne nur por restarigi nian organizon, sed ankaŭ por stimuli nin ĉe la plenumo de nia tasko.

Multaj plendoj, ĝis nun ricevitaĵ, estas pravaj, sed ni faras nian eblon por forpreni la kaŭzojn. Sed estu nepre konvinkitaj, ke nur per via kunlaboro, per via aktiveco, F.E.J.C. povos veni el la nuna krizo kaj ree kreski kaj flori. Al vi la tasko agi laŭ tiu konvinko!

Roel Kraefft, prezidanto.



Komunikoj



K O F I Z O ! / Ek de septembro komenciĝis la nova organiza jaro de F.E.J.C. kaj la nova abcnjaro de "La Juna Vivo". Ek de tiu dato vi do ŝuldas kotizon por la nova jaro. Sendu jam nun vian kotizon al la peranto de via regiono.

Membroj en Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando bonvolu atenti, ke por iliaj regionoj elektiĝis aliaj perantoj.

Plena listo da perantoj kaj kotizoj ni aperigos en la novembro eldono de L.J.V.

P E R A N T O J A P E N T U . / Nun venis la tempo por enkasigi la kotizojn por la nova jaro. Bonvolu trasendi la monon kiom eble plej baldaŭ al la centro, ĉar ni nepre bezonas ĝin por la pluaperigo de la gazeto.

Al tiuj perantoj, kiuj ne jam sendis jarraporton kaj membroliston, ni petas plej eble baldaŭ fari tion. Sendu ilin al la administracio de F.E.J.C., Steenschuur 10, Leiden (Nederlando).

D O N A C O E L A N G L I O . / Ni danke kvitancas la ricevon de 50 anglaj funtoj (pli ol 550 nederlandaj guldencj), donacitaj de la angla sekcio por amortizi la ŝuldon ĉe la presisto. La sumo estas rekte transdonita al la presisto. Imitinda ekzemplo !

LA I.J.K. EN L'AQUILE

En L'Aquile oni jam komencis la preparojn por la 11a I.J.K. de F.E.J.C. La urba estraro donacis jam 10.000 lircojn, per kiuj la organizantoj povis eklabori.

Formiĝis jena provizora Loka Organiza Komitato:

Prezidanto: Giorgio Bronzetti,

Vicprezidanto: Giorgio Marinucco,

Sekretariejo kaj kaso: Nando Nardis, Zecca Bruno kaj Antonio Amadei.

Adreso: S:ro G.BRONZETTI, V.S.MARTINO 8, L'AQUILE (Abruzzi) ITALIA.

Datoj de la kongreso: La kongreso okazos de la 7a ĝis la 13a de aŭgusto 1955a.

Preparo de karavanoj k.t.p.: Landaj kaj grupaj perantoj jam nun kontaktu kun L.C.K. pri la preparo de komunaj vojaĝoj. ĉe diversaj entreprenoj oni donas rabaton por grupvojaĝoj, elprofitu tiujn okazojn kaj frue informiĝu.

ĉu vi loĝas tre malproksime de Italujo ? ĉu vi opinias la vojaĝon tro kosta ? Precipe se vi devas respondi jese, vi jam nun ekaktiviĝu por la venontjara I.J.K. Fondu lokan subtenan kason, okazigu loterion, teatraĵprezentojn, fabriku kaj vendu objektojn kiel ekzemple cindrujojn, paĝindikilojn, insignojn k.s. Montru la internan forton de via grupo kaj komune laboradu por realigi la vojaĝon al L'Aquile. Ankaŭ unuopuloj povas havigi al si kromenspezojn por financi la vojaĝon. Nepre streĉu viajn fortojn, ĉar la dekunua fariĝos unika !

Ankaŭ en L'Aquile la F.E.J.C.ancj aktivas por kolekti monon por la kongresa kaso. Ili luis por la tuta vintro salonon de granda hotelo kaj tie okazigos balojn. Unu el la multaj manieroj, per kiuj oni povas kolekti monon, necesaj por la kongreso.

Programo, kongreskostoj: Pri ambaŭ punktoj ne jam eblas promesi ion definitive. Planitaj estas ekskursoj, kunsidoj, konkursoj kaj fest-vesperoj. La kongreskostoj estos plej eble malaltaj, ĉiukaze malpli ol la prezoj de la I.J.K. en Hilversum.

Atentu la komunikojn en sekvanta L.J.V. kaj jam nun ekaktivu por prepari vian vojaĝon, ĉar

Respondo

AL AMIKAJ-LETEROJ



En la frontpaĝa artikolo mi jam skribis, ke multaj amikoj de F.E.J.C. reagis al la alarmkriĉoj en marta kaj aprila L.J.V.-oj. Kvankam mi preferus publiko respondi ilin ĉiujn, mi povas trakti nur kelkajn en L.J.V. ĉiuj skribintoj nepre ricevos personan respondon, kaj vi estu konvinkitaj, ke ankaŭ estonte ni ŝatas ricevi tiajn leterojn.

Mi volas komenci per letero, kiun s.roc Symes el Anglio skribis junaj aŭ pliaĝaj gvidantoj? reage al la raporto de s.ino Burgler pri Wörgl. El lia detala letero mi citas: "La estraro devas esti elektata el unu lando, sed la ĉefa tasko estas elekti viglajn, honorindajn kaj spertajn prezidanton, sekretarion, kassiston kaj redaktoron. Nepre, laŭ mia opinio, tiuj devas esti plenkreskuloj. (Ho jes, junuloj, sendube vi havas sufiĉe da sperto por bone funkcii en tiuj oficoj, sed ĉirkaŭ vi estas multaj aliaj pli allogaĉoj - kaj studado)" Kaj aliflanke: "Sen plenaĝuloj spertaj la Organizo pereas. Multfoje mi spertis la pereon de junul-klubo en Anglujo. Je la komenco la klubo bone funkcias sub gvidado de plenaĝa komitato, helpata de junuloj. Poste oni forigas la plenaĝulojn kaj tiam komencas la detruo de la klubo. Jen kaj jen oni trovas sufiĉe fortan kaj spertan junulon por supervenki la krizon. Sed tiaj junuloj oni nur malofte trovas."

Kara amiko Symes, mi estas junulo 23jara, kaj miaj spertoj en la junul- kaj Esperantomovado datumas de post la milito. Tamen mi ne hezitas respondi viajn argumentojn, kontraŭi ilin. Mi vidis pereitajn junulklubojn memstarajn, sed ankaŭ grupojn, gvidatajn de plenkreskuloj. Mi vidis krome pereitajn klubojn, ekskluzive por plenaĝuloj.

La problemo laŭ mi pli rilatas la povejojn de la gvidanto ol lia aĝo. Bonaj gvidantoj estas malfacile treveblaj. Sur ĉiu tereno de la scio vivo oni sentas mankon je vere bonaj gvidantoj. Mi konsentas, ke inter la junularo la gvidantoj estas pli malfacile treveblaj ol inter plenkreskuloj, sed tamen mi memoras, ke la sekretario de la plej granda Esperanto-organizo antaŭmilita en Nederlando, estis junulo 18jara. La jarkunsido en Hilversum klare esprimis sian preferon por junula estraro, sed mi volas aldoni, ke tiuj junuloj nepre estu bonaj gvidantoj.

S.roc Symes krome rimarkigas, ke nuntempe ne movado malhavas la revarbado de lernejoj i/ grandan nombron da lernejoj, kiuj antaŭe estis membroj kaj partoprenis niajn kongresojn.

Sendube la altigintaj kostoj parte kulpas, sed aliflanke ankaŭ la programoj ŝanĝiĝis, fariĝis pli "aĝaj". Ni staras antaŭ malfacila problemo; hmc 15 jara kaj alia 21 jara estas ambaŭ junuloj, sed ili interesiĝas pri diversaj aferoj. Por kiuj oni destinu la programon? Prefere por ambaŭ kategorioj, sed ĉar la pli aĝaj junuloj formas la plimulton, ni tre facile emas tre atenti ilin. Tiu ĉi problemo havas la atenton de la estraro kaj mi tre ŝatus, ke ankaŭ la membroj esprimus sian opinion pri ĉi tiu temo.

S.roc Leslie el Londono starigas la demandon, "ĉu vere la junuloj ĉu la junularo estas indiferentaj?" estas indiferentaj aŭ ĉu la estroj de F.E.J.C. aŭ de la "plenaĝula" organizo mem kulpas pri la mortanta stato de F.E.J.C.?"

ili/ Mi ne kredas, ke la junuloj nuntempaj estas indiferentaj. Sed estas laŭ mi praktikemaj kaj oni povas ilin interesi ilin nur por konkretaj celoj. Fia celo povas esti la preparo por kongresvojaĝoj. Ĉijare la kongreso estas por multaj tiom malproksima, ke el propra poŝto ili ne povas financi la vojaĝon. Ĝuste nun la grupoj aktivu poriel ajn kolekti monon. Konkreta celo kun alloga rezultato: vojaĝo al Italujo. Per tiaj aferoj oni povas entuziasmigi kaj aktivigi la junularon. Pri la malbona stato de F.E.J.C. grave kulpas la nekompleto de niaj lastaj estraroj; ili nur povis administri, sed ne vere gvidi kaj instigi la organizon. Sen volforta estraro, sen vera gvidado ĉiu organizo pereas. Sed ankaŭ kulpas la "plenaĝula" Esperantomovado.

En ĉiuj Esperanto-organizoj oni plendas pri malhavo de junaj membroj, sed oni forgesas, ke oni ne povas interesi la junulojn per Esperanto nur per la nunaj "plenaĝulaj" movadoj. En ĉiuj politikaj, religiaj k.s. movadoj oni varbas la junularon per apartaj junulorganizoj. Nur en Esperanto tio ŝajnas nebla kaj nekomprenebla, mi spertis ke oni trovas en la Esperantomovado grandan kontraŭstaron je junula laboro kaj la bonvolantoj ne povas konvinki la plimulton.

"Ĉu la gazeto vere provizas la ĝustan materialon por modernhavo de La Juna Vivo./ naj gejunuloj ?" demandas s.ro Leslie. Jen io, pri kio respondi estas malfacile. Lastatempe la enhavo de L.J.V. plibonigis, sed la redakcio devas ĵuĝi preskaŭ tute sole. Necesas, ke la membroj sciigu al la redakcio sian opinion kaj mi volas insiste peti, ke oni faru tion. Skribu al ni, kiajn artikolojn aŭ rubrikajn vi preferas. Kritiku konkrete, tio estas por ni pli facile ol ke vi nur diras, ke la gazeto ŝajnas al vi nealloga.

S.ro Leslie krome starigas la demandon, ĉu F.E.J.O. vivas tro F.E.J.O. tro izolita ?/ sendependa. ĉu ne estus pli bone, ke la landaj sekcioj ligus sin al la landa asocio kaj kunlaborus kun ĝi. "La Esperanto-movado devus esti esti granda familio, ĉu ne ?"

Ĉi lasta demando jam respondas: La Esperanto-movado ne estas granda rondo familia. Imagu, ke la nederlanda sekcio de F.E.J.O. volus sin ligi al landa asocio. Al kiu asocio ? Ĉu al la neŭtrala organizo L.E.E.N. ? Sed tiam multaj F.E.J.O. membroj, kiuj estas anoj de la laborista, katolika aŭ kristana movado forlasus nin. Same ni perdus multajn membrojn, se ni aliĝus al alia, tendenca movado. F.E.J.O. estas supertendenca organizo, ĝi do nepre ne povas ligi sin al tendenca movado, sed ankaŭ ne al pure neŭtrala organizo.

Alia demando estas, ĉu la landaj asocioj ŝatus kunlabori kun F.E.J.O. Laŭ miaj personaj spertoj mi devas respondi: Ne. En la Esperanto-organizoj oni ne fidus la junularon, opinias ilin nesericzaj, nepersistemaj, nekapablaj. Ne miru pri tio, en nia propra organizo ni renkontas ja saman opinion ! Pro tio la junularo mem fosis sian solkun, mem gvidu kaj kreskigu sian organizon, por pruvi, ke la malfido de la pliaĝuloj estas neĝusta. Kaj mi volas peti la plenaĝulojn, kiuj apartenas al nia organizo: Havu fidon en la junularo ! Via nuna estraro estas parte pliaĝula, parte junula. Nepre fidu je ambaŭ kategorioj. (kiuj kune tre bone kaj harmonie povas labori) Neniu estraro povas ion atingi sen fido de ĝia membraro. Kaj same la junularo malfacile povas ion realigi, renkontante nur pesimismen kaj malfidon. Fial mi nepre esperas, ke ĝuste la pliaĝuloj en F.E.J.O. ne forlasos nin kaj subtenos la agadon de la estraro.

Letero de s.ro Charles Bardsley el Anglujo petas nian atenton. junuloj rajtas ĵuĝi pri F.E.J.O., do ankaŭ laboru por ĝi !/ La skribinto estis membro de F.E.J.O. dekomence kaj plenas, ke "la junuloj havu la rajton diri kio estas farenda kaj la tiel nomataj "maljunuloj" faru la laboron !" Krome li skribas: "Laŭ mia informo kiam la junuloj mem surprenis la estradon de F.E.J.O., ili senpense forpuŝis plurajn malnovajn laborantojn por la junula movado. Nun, kiam la junuloj trovas ke, pro diversaj kialoj, ili ne povas daŭrigi la laboron, ili alvokas pro helpo por ke la organizo ne pereu."

Dum la jarkunsido en Hilversum mi entuziasme pledis por junula gvidado de F.E.J.O. Ne, ĉar mi ne povas kunlabori kun pliaĝuloj, sed ĉar la junularo mem faru la laboron, mem spertiĝu per tio kaj tiel estu post sia junaĝo spertaj kaj valoraj laborantoj en la pliaĝulaj organizoj. Krome en F.E.J.O. povas vĉdoni nur aktivaj membroj, tio estas membroj malpli aĝaj ol 30jaraj. Mi ĝojas, ke en Hilversum pluraj junuloj pretis akcepti funkciojn en la estraro kaj kiel perantoj, kvankam la situacio estas nun tre malfavora kaj ni devas vere tiri F.E.J.O.n el la ŝlimejco. Sed Hilversum certe ne forpuŝis la pliaĝulojn. Lia estas la situacio nun kaj oni povas konstati supre, ke la estraro ŝatas ankaŭ la aktivadon de niaj pli aĝaj membroj. Por ŝavi F.E.J.O.n nun, mi ripetas, ĉiuj amikoj de la movado streĉu siajn fortojn. Kaj nepre malaperu la abismo inter junuloj kaj pliaĝulej, ambaŭflanke regu toleremco kaj komprenemco.

S.ro B. Graf, gvidanto de la Svisa Esperanto Junularo nomas kaŭzojn de la nuna krizo./ du kaŭzojn por la nuna krizo en F.E.J.O.:

"1) granda manko da mono pro nepagemo de la perantoj landaj;

"2) foresto de kapablaj kunlaborantoj en la estraro."

Ambaŭ rimarkigoj estas pravaj kaj havas nian plenan atenton. Rilate la perantojn en Hilversum jam elektiĝis kelkaj novaj perantoj kaj la estraro krome serĉas anstataŭantojn por tiuj landoj, en kiuj la perantoj ne aktivis. Piurilate ni devas rigore agadi, malaktivaj perantoj

nur malutilas la movadon. Pri la nekompleteco de la estraro mi jam skribis, ke ni provos serĉi kapablajn kunlaborantojn kaj kvankam ne tuj, ni tamen opinias tion realigebla. S-ro Graf krome opinias, ke la kontakto kun U.E.A. devas esti pli firma, "ĉar en la junular-movado prepariĝas la junaj batalontoj, kiuj foje transprenas la gvidadon de la plenkreskula movado." Ĉi tiun sugeston ni esploros kaj siatempe ni revenos je ĝi.

Parton de la letaro de s-ro Graf mi volas citi sen komento, idealismo de la junularo. / ĉar mi kredas, ke ĝi prave tuŝas la kernon de la junulara problemo: "Estas danĝere, paroli pri la idealismo inter la junularo. Laŭ miaj spertoj, la hodiaŭa junularo estas nek idealisma nek egocisma, sed tute simple meze inter ambaŭ tendencoj en plena evoluo. La junulara pensmaniero plej ofte ne estas memstara, sed influigebla de la gvidaj personoj kaj instancoj. Pial ni devas atente semadi inter la junula junular-gvidantaro, kiu en alta grado influas la junulan pensadon. Sed ĉu la emfazo pri la idealismo estas necesa por la propagando de nia ideo? Ne prene! La klopodoj pri la enkonduko de internacia lingvo estas praktika postulo de nia epoko kaj ni argumentu ankaŭ tiel. Ni devas doni al nia afero aktualan, ne teorian aspekton."

Kaj plie s-ro Graf rimarkigas: "Dum preskaŭ ĉiuj junular-ren-laborado kaj amuzado. / kontigoj mi devas konstati la nesufiĉan lingvokonon. Konversacio libera malfacile estas ebla ĉe tiuj cirkonstancoj, tiel ke la propra kontenteco kaj lingvamo malaperetas. Ekzemple en Ry Danlando dum la ĝenerala kunveno de F.E.J.C. nur parteto partoprenis la diskutojn. La plimulto do ne interesiĝas pri la kurantaj problemoj de F.E.J.C. . Mi estas neniel kontraŭ distrado kaj amuzado, sed oni devus ankaŭ trovi la emon al vera kunlaboro. Sen tio, la junulara laboro estas senenhava."

Sendube la lingvokonon estas grava faktoro dum ĉiu esperantista kongreso. La malfacilaĵo estas, ke multaj komencantoj partoprenas kongreson aŭ renkontiĝon per plibonigi sian nesufiĉan lingvoscion, sed mi dubas, ĉu tiu metodo estas rekomendinda. Pro ofte la t.n. komencantoj estas neniconsciencoj, kaj por povi spertiĝi dum kongreso oni havu almenaŭ elementan konon pri la lingvo. Problemo, kiu ne estas solvebla en F.E.J.C. Necesus, ke ĉiuj gvidantej de elementaj kursoj havu por tio diplomon kaj ke ĉiu kongresano estu minimume finpartopreninta elementan kurson.

Jen geamikoj, kelkaj respondoj al leteroj, kies publikigon ŝajnis al mi grava por ĉiuj membroj. Mi volas fine doni ĝeneralan respondon je la demando, kiel ni savu F.E.J.C.n el la nunaj malfacilaĵoj. Tiu respondo estas unuvorta, nur "Aktivado!". R.K.

Ĉ u v i ŝ a t a s r i c e v i

PRESITAN L.J.V.?

Ni tre ŝatus ekspedi ĝin, ĉar la stenciligo de L.J.V. okazas nur provizore. Tamen L.J.V. povor aperi presita nur, kiam ĝia financa kaj organiza bazo, F.E.J.C., estas sana kaj fortika. Kaj por tion atingi oni agu jene:

- 1) AKURATE PAGO LA KONIZON
- 2) VARBU NOVJAJN MEMBROJN KAJ ABONANTOJN
- 3) ALIGU AL LA DEKUNOA I.J.K. de F.E.J.C. EN L'AQUILE

nederlandaj F.E.J.C. membroj atentu!
SANKTA NIKOLAO-FESTO EN BLARICUM

Sendube la partoprenintoj memoras la bone sukcesintan semajnfincn, dediĉita al S.ta Nikolao, kiu okazis pasintjare en la junular-gastejo en Amersfoort. Tiu neforgesebla semajnfino instigis la nederlandajn junajn esperantistojn ankaŭ ĉijare okazigi tian festenon. La sanktulo jam promesis ĉeesti parton de la semajnfino. Ĝi okazos la 11a kaj 12a de decembro en la junular-gastejo de Blaricum. Anoncojn sendu kaj informojn petu ĉe Joop Ephraïm, Rochus Meeuwiszstr.35, Utrecht.

VERDLANDO



vokas

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo.

Mallongigoj: I=informoj, P=paroladeto, K=kurso, M=muziko.

LUNDE: 12.30-14.00 La coruĥa (Hispanujo), 250 m.: P kaj K

23.10-23.20 Vieno I, 25.46 m, 48.74 m, 513 m : I

MARDE: 12.55-13.00 Berno 19.60 m, 31.46 m, 48.66 m, 75.28 m : P

15.30-15.45 Montevideo (Urugvajo) 280 m : P (nur la unuan mardon de ĉiu monato.

15.50-16.00 Ljubljana (Jugoslavio), 327 m, 211,4 m : K

18.35-18.40 Berno, ondlongoj kaj P kiel 12.55

23.30-24.00 Valencio, 200 m : P

MEKREDE: 16.30-16.40 Vieno II, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m, 203 m : P

17.00-17.10 Caramulo (Portugalujo), 206m, P de Alfred Sales

18.50-19.10 Romo, 31.35 m, 49.92 m; P de Luigi Minnaja

20.30-20.45 Barcelono (Katalunujo), 360 m : I kaj K

23.15-23.20 Hilversum II, 298, 188 m, V.A.R.A. : I

23.15-23.20 Hilversum I, 402 m, N.C.R.V. : P kaj M (nur 27/X/54)

JAŬDE: 08.30-08.35 Rijssel (Lille) 218 m : P kaj K de prof. Labit.

09.30-09.45 Parizo, 348 m : K. de Pierre Delaire

12.55-13.00 Berno : P. de Edmond Privat : "Esperanto-ideologio.

18.35-18.40 Berno kiel supre

23.50-24.10 Zagreb (Jugoslavio), 264,7 m : P.

VENDREDE: 18.50-19.10 Romo, 31.35, 49.92 m; P de prof. d.ro V. Musella

22.30-22.45 Guatemalo, 30,50 m, 47 m, 197 m, 470 m : I

SABATE: 09.30-10.00 Rio de Janeiro, 30.71 m, 375 m : K kaj I.

23.15-23.20 Hilversum I, 402 m, K.R.O. : I.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al : S.S. de Jong Dzn, Radio Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, BIERKWERD (Fr), Nederlando.

LET E R V E S P E R O

Esperanta junulara grupo en Ostrava aranĝas por siaj kursanoj la 8-an de decembro 1954 letervesperon. Bonvolu nin subteni per salutkartoj kaj salutleteroj. Skribu al: Zdeněk Škvrna, Dvořákova 7, Ostrava I, ĈSR.

POST LA KONGRESO DE IEJO

La sama junulgrupo, kiu kunlaboris en la granda festvespero de la hilversuma I.J.K. prizorgis kabaretprogramon en la kadro de granda ekspozicio en Hilversum. La grupo kunlaboris dum unu vespero de la ekspozicio kaj prezentis dufoje duonhoran kabaretprogramon. En la kadro de ĉi tiu programo nia prezidanto, Roel Kraefft, faris propagandan paroladeton.

La kongreso rezultis la starigon de I.E.J.O. sekcio en Hilversum. La nova sekcio esperas esti centprocente reprezentate en L'Aquile kaj krome intencas organizi pentekostan renkontigon por junaj esperantistoj en Nederlando.

MALLONGE ...

- + La Esperanto-elsendoj de Radio Lille rekomencis la 9an de septembro. Lasttempe, ili dissendis plurajn intervjuojn pri I.E.J.O.
- + La gazetoj SAARBRUCKER ZEITUNG kaj KINDERPOST amplekse raportis pri la vojaĝo de la zorganto de nia Infirma Fakto al Saarlando.
- + I.E.J.O. estis reprezentata ĉe la inaŭguro de nova Zamenhofstrato en Antverpeno (Belgujo).
- + Kolorfilmoj kun Esperanto-teksto nun ekzistas pri Aŭstralio kaj Nederlando.
- + 4 Belgaj urboj eldonis esperantlingvajn faldfolioj: Antverpeno, Bruĝo, Gento kaj Spa. Petu ilin ĉe la koncernaj urbaj turism-oficejoj.
- + Ne forgesu legi L.J.V. !